1-A JARKOLEKTO
marto/
aprilo
1 9 8 9

# ABC en la Internacia Lingvo Esperanto



# INTERVJUO

"A B C" ĈINUMERE PREZENTAS INTERVJUON KUN NÉIA LÚCIA SOUZA, PREZIDANTINO DE BEL-BRAZILA ESPERANTO-LIGO:

ABC - <u>DE KIAM KAJ KIAL VI INTERESIĜIS PRI ESPERANTO?</u>
NÉIA - Mia intereso pri E-o venas el mia infanago. Mia patro kaj aliaj familianoj studis E-on, kaj la ricevado de bild-kartoj, leteroj, fotoj kaj cetere, el landoj pri kiuj mi neniam aŭdis antaŭe, la ebleco atingi forajn landojn kaj koni misterajn popolojn estis ja treallogа!Post mi eniris kurson, konis esperantistojn kaj... kompletiĝis la pikado de la"verda viruso".

ABC - <u>KIO ESTAS VIA ĜENERALA OPINIO PRI LA NUNTEMPA ESPERANTO-MOVADO EN BRAZILO?</u>

NÉIA - Ĝi ne estas tre malsimila ol ĝi estis antaŭ kelkaj jaroj.Se ni mezurus, eble ni konstatus , ke kvante ĝi ne multe kreskis.La lokaj asocioj daŭre laboras izolitaj (kiam laboras) kaj ĝenerale la esperantistoj ne aliĝas al la movado (lokaj grupoj, ŝtataj kaj landaj ) por kunigi la fortojn.Atentu, ke "aliĝi" ne estas nur pagi kotizon sed partopreni en la laboroj.La situacio en la landa organizaĵo ŝanĝiĝas - sed ne ĝis la punkto, ke la rezultoj de tiuj ŝanĝoj aperu klare al ĉiuj okuloj.Nia movado havas grandan potencialon sed estas tre malfacile tuŝi la individuojn ĝis la punkto ke ili movu samcele, tio estas: por la plifortigo kaj efektivigo de nia landa movado.BEL, kiel nacia organizaĵo, devus respeguli la landan movadon kaj tio (ankoraŭ) ne okazas.La motivo estas la antaŭaj menciitaj aferoj:Par-

to de nia esperantistaro, asocioj kaj individuoj, agas dise, dum alia parto baraktas, ĉiam atendante ion de iu kaj siaflanke kontribuas per nenio al la disvolviĝo de la movado (substreko nia). Resume, mi opinias, ke kiam ni sukcesos organizaĝi kaj bone eluzos la menciitan potencialon de nia esperantista popolo, tiam la brazila movado fariĝos ege kompetenta.

ABC - KIEL FARTAS "BEL"?

NÉIA - La nuna estraro elektis priatenti la strukturigon de la organizo, kaj laboras tiucele. La fakto estas tia, ke kiam vi klopodas organizi entreprenon, maniere ke ĝi restu tiel dum la sekvantaj jaroj, la rezultoj ne aperas tuj. Ni ne povas forgesi, ke BEL estas 82-jara organizo kiu dum jaroj ne klopodis (aŭ ne povis) akompani la mondan evoluon, kaj ni nun strebas por reakiri la ekvilibron.

ABC

Foto: Roberto Resende



Néia, en la centro, okaze de kurso aranĝita de EAB (1986)

ABC - KIO NOVA PRI: A) "BRAZILA ESPERANTISTO"?

NÉIA - Ĝi estas survoje kaj jen ekzemplo de manko de firma strukturo en la organizo - ni havas kompetentan redaktoron, kvalitan materialon por publikigo, amplekan adresaron kun ebla interesata publiko sed ĝis nun mankis mono por eldoni ĝin. Kaj estas speco de "neĝa bulo": verŝajne multaj esperantistoj ne pagas BEL-kotizon pro tio, ke ili ricevas nenian informilon flanke de BEL, kaj BEL ne sukcesas eldoni la informilojn ĉar ne enspezigas sufiĉan monon por plenumi tiun taskon... (NdlR: plej ĵuse oni estis informita de "Ligilo", oficiala informilo de BEL, ke S-ro Gilbert Ledon, el San-


Paŭlo, financos la unuan eldonon de la revuo, kio indas
nian elkoran aplaŭdon pro la iniciato).


## B) KONGRESO EN MACEIÓ?

NÉIA - Ĝi estis ja pruvo , ke nia movado havas kvalitan
potencialon.Ĝi montris, ke eblas kongresi por aktive la
bori anstataŭ nur pasive spekti prelegojn k.s.La kongre
so estis malgranda kaj eĉ malkomforta (ĝi okazis samtem
pe kun la inundado en ŝtato Alagoas), sed tiuj kiuj voj
aĝis ĝis tie ege kontribuis al la plibonigo de BEL kaj
konsekvence al la plibonigo de la landa movado.La amas-
komunikiloj antaŭ kaj dum la kongreso malfermis bonan s
pacon por Esperanto kaj la libroservo, organizita kaj
enhavoriĉa, furore vendis.Krome, bone impresis kaj funk
ciis la ekzamenojn tri gradajn preparitajn de ILEI-re -
prezentantino en Brazilo, S-ino Elvira Fontes.

## Esperanto-Societo de P.Alegre

Propra sidejo: Andradas, 1137/1704 BR-90020 Porto Alegre
RS, Brazilo Poŝt-kesto 1415 Fondita je 2/4/1945 Rekonata
kiel havanta publikan utilecon laŭ municipa leĝo n-ro
483 de 13/11/1950 Estrarperiodo 87/89: prezidanto: Solon
F. Santanna, vic-prezidanto: Ivo Sanguinetti; 1-a sekre-
tario: Cesar D. Soares; 2-a sekretario: B. Egon Breiten-
bach; kasistino: Itamira L. Gomide, bibliotekisto: Alci-
des L. Cardia ABC estas dumonata revuo de ESPA Ĉef-redak
toro: Cesar D. Soares Redakcia adreso: Mal. Frota, 278
BR-91350 Porto Alegre, RS.Nacia cirkulado. Jarabono pa -
genda per noma ĉeko al la ĉef-redaktoro: NCz$ 3, 00. Oni
petas interŝanĝon.Ĉiu kunlaboraĵo estas bonvena!



# LA INSULO

César Dorneles Soares

FEBRUARE 1988 MI TURISME IRIS AL KUBO 13-TAGE. SUBE IMPRESOJ KAJ OPINIOJ PRI IU NEFORGESEBLA TRAVIVAĴO.

## L E G A Ĵ O J

Mi ĉirkaŭrigardis la enon de librovendejo en Cienfuegos kiam mi vidis modestvestitan kubanon eniri la ejon kaj ekdepreni unu, du, tri, ...sep, ok librojn el la bretoj - inter ili ekzempleron de la partia programo - kaj akiri ilin. La fakto estas, ke en Kubo la libroj estas tre ĉipaj (ne estas tro luksaj eldonoj kiuj plialtigas la prezon kaj faras, ke la libroj povas esti nur konsumataj de malplimulto). Krome, tutklare es-

tas rekta rilato inter leg-nivelo kaj eduk-nivelo,ki u en Kubo estas vera prioritato...Ne hazarde la averaĝa eldonkvanto de libroj en Kubo estas 15 mil ekzempleroj kontraŭ 3 mil de Brazilo.

E N  N I A J  M A N O J . . .

Fronte al la sidejo de Kuba Komunista Partio troviĝas ŝildo kun la jena skribaĵo: "En nuestras manos estan las banderas del' año 2000".

"H A B A N A  R I V I E R A"

Alveninte Kubon nia (kaj lasta) "hejmo" estis la hotelo "Riviera", ĉe la golfo, unu el la plej luksaj gastigejoj en Havano.Onidire ĝi estis konstruita de "Máfia" du jarojn antaŭ la Revolucio de 1959.Kiel vi scias ĝistiuepoke Kubo estis iu speco de usona tropika bordelo kaj la hotelo "Riviera" kun ĝiaj vastaj salonoj ter-etaĝaj por kazinaj ludoj hodiaŭe uzitaj por spektakloj kiel ĝaz-festivaloj memorigas nin pri tiu epokaĉo.

S A N O

Samekskursanino el Rio rimarkigis min dum nia aŭtobuso transiris internlandan vilaĝeton, ke ĉiu infano senescepte portis siajn ŝuetojn.Signalo de la fama preventa medicino de Kubo.Se paroli pri sansistemo, mi rakontu anekdoton:venzuela kuracisto scivoleme demandis de kuba junulino kiom ŝi devis pagi por ĵus farita ekzameno pri komputiligita tomografio.Ŝi surprize respondis: "Tutklare mi pagis neniom!Ĉu vi pensas, ke mi krom malsaniĝi devus pagi por ekzameno?!" Alia lando. (P L U A S  V E N O N T N U M E R E)




# Korespondaĵoj

EL CAÍ/ RS:
"Lasta ABC, bonega!! Ĉefe la humuraĵoj.Gratulojn!" (Vaske)

EL CURITIBA/ PR:
"Mi legis ABC kaj ĝia legado tre plaĉis al mi." (Armando S. Tuoto)

EL FISMES/ FRANCIO:
"Unu vorto pri la de vi sendita ekzemplero de ABC: elstara! Vere belaspekta, altkvalita kaj tre interesa.Brave! (tion mi lernis en ABC!).(...)Min tre interesis via artikolo pri Edgar Cayce." (André Jacquesson)

EL BRAZILJO/ DF:
"Pri ABC: ege bela.Sed kial privata afero?" (Néia L.Souza)

EL SAN-PAŬLO/ SP:
"Ĝi /ABC/ estas tre varia en simpatia stilo." (Tuca)

EL SALVADOR/ BA:
"Mi informas al vi, ke en la lasta semajno de oktobro de la kuranta jaro, nia Studgrupo "ZAMENHOF" ricevis la bonan gazeton ABC, de vi sendita.Estas tre interesa al ni la enhavo legita, ĉar ni povis scii kelkajn aferojn pri via ŝtato kaj ankaŭ aliaj novaĵoj.Anoj de Esperanta Studgrupo "Zamenhof" dankas al vi la sendadon de tiu gazeto ABC kiu plezure estis prezentita al ĉiuj esperantistoj, dum nia ĉiuvendreda renkontiĝo." (Inácio B. de Araújo, sekretario de ESZ)

EL NOVO HAMBURGO/ RS:
"Rilate al ABC mi kredas, ke ĝi estas tre bona informilo al nia esperantistaro." (Alice A. Klein)

**SUGESTU, KRITIKU, OPINIU, REAGU!**

# Ja!



## sekseco

Ha, la timo kiun oni havas pri ĝi!Oni provis nei, ekzorci, bruligi ĝin en ŝtiparo, reteni ĝin.Hodiaŭe ĝi ankoraŭ restas diskriminaciita, kontrolita, aŭ mise konfuzita kun pornografio, simpligante modelojn kaj manierojn de interrilato, sinteno.Oni paralizas ĝian liberan fluon en libraĉoj, revuetoj, pseŭdo-manlibroj pri pseŭdo-informoj.Ĝi estas karikaturita, aŭ eĉ transformita en pseŭdo-sciencon . La erotika arto aliiĝis en seksan sciencon, laŭ Foucault, kio estas bedaŭrinda afero, iu negrava fokuso.La termino "seksa edukado" estas fuŝa.Informi pri sciencaj aferoj rilate al la funkciado de la organismo kaj ĝiaj organaroj - iu ajn - spira, digesta, reprodukta ktp, tutklare estas normale kaj necese.Sed reprodukta funkcio estas unu afero. La sekseco estas tute alia.Sciencaj donitaĵoj pri menstruado, noktaj polucioj, masturbado, gravediĝo, kontraŭ-konceptado, diferencoj inter la reprodukta organaro de la viro kaj tiu de la virino, AIDS, venereaj malsanoj, higieno ĉu de la dentoj ĉu de la seksaj organoj ktp - tutklare,ke ili devas esti pritraktitaj ĉe lernejoj samkiel matematiko, historio aŭ geografio.Mi trovas superflua, ke oni volas instrui pri sekseco; alie mi opinias, ke teoriaj lecionoj estus ridinde sensencaj.Mi vidas infanojn ĝenitaj de la adolta zorgumo rezervi apartan sintenon por la seksa informado.Se oni estus spontaneaj, oni transdonus noción ekde la unua tago de ilia vivo.Unuafoje preni filon en la brakojn okazigas emocion, plezuron kiuj igos la infanon

senti, ke ĝi estas amata, ke ĝia korpo estas grava, ĝia odoro, ĝia haŭto, ĝia elspiraĵo, ĝia voĉo partoprenas en iu proceso de komunikado inter ĝi kaj ĝiaj gepatroj= ĝia mondo - kiun ĝi lernos kiel restigi malfermita. (...)Se preni filon en la brakojn ne estos plezura afero, estos malfacile, streĉe, se mam-nutrado okazigas doloron, malbonfarto, neado - tiam ni donos lecionojn pri Kontraŭ-Eroso, kondukante la infanon al la rigideco, al la senamo, al la morto.Vidu, tiuj estas la nuraj lecionoj pri seksa edukado fakte gravaj: la unuaj kontaktoj kun la filoj.(...)Lernigi ilin vivi kun mesaĝo pri kareso kaj akceptado kaj ne kun mesaĝoj pri kaŝa malakcepto - tiele ili estos iniciantaj en la "ars erotica", kio estas pli multe grava ol la "sciencia sexualis". (HELENA DAGNINO, en la Porto Alegre-a semajngazeto "RS")

---

# LA IMPERIO MORTIS

Gore Vidal havas eseon titolitan "La Tago en kiu Finigis la Benzino en la Usona Imperio"aldonita al sia lasta esearo "Armageddon?".La komenco estas ekzempla:"En la 16a de septembro, 1985, kiam la Departemento pri Komerco anoncis, ke Usono farigis ŝuldanta lando, la usona imperio mortis.La imperio estis 71-jara kaj fartis tre malbone ekde 1968.Kiel la plej granda parto el la modernaj imperioj, la nia surbazigis nek tiom pri militistaj bravajoj kiom pri ekonomia supereco."Vidal iras rekte al la punkto, kio "analizistoj" venditaj al "lobbies", aŭ simple misinformitaj, estas nekapablaj.En 1914 - Unuan Mondmiliton - Novjorko anstataŭis Londonon kiel financan ĉefurbon en la planedo.La financa povo pasis de la Malnova al la Nova Mondo.La angloj ne plendis.La destino de la anglosaksa raso plue estis portanta "la pezon de la blankulo" (la esprimo, rasismo enmetita, estas de Kipling).La angloj trovis, ke Usono supervidos kaj civilizos la "reston".Krom tutklare gajni multe da mono. La imperio donis monon.Multe.Sed ĝi ne distribuis civilizon almenaŭ laŭ la klasika maniero.La imperio estis ĵetitan en daŭran milit-ekonomion.Defend-industrio ekmonopolis ĉion.Ĝi konsumas du trionojn el la rento de usona registaro, ĝi elektitigas praktike ĉiujn politikis-

PLUAS

## LA IMPERIO MORTIS/daŭrigo

tojn, ĝi "irigas" la nacion.La imperio hodiaŭ sekve al tio disfalas laŭ la rento "per capita", laŭ krimeco, laŭ takso pri alfabetigo.La eduksistemo implodis.Preskaŭ duono de Usono ne scias legi kontentige - des pli malbone scias formi propran opinion kaj subteni kritikan spiriton.La ŝuldo estas pli ol 2 trilionoj da dolaroj - la nacio pli ŝuldiĝinta en la historio.Por kompletigi, la financa povo pasis de Novjorko al Tokio - eĉ antaŭ ol la "crack" de '87 en Wall Street.Kio pri la estonteco ? Vidal konjektas pri du eblecoj.Unu estas la flava invado: la alianco inter la avancita teknologio de Japanio kun la tero kaj grandega loĝantaro de Ĉinio.Eblas.La alia estas tiu de la nuklea hipotezo. (far PEPE ESCOBAR, revuo HV n-ro 10; tradukis C.D.Soares)

---

LISTA DAS PUBLICAÇÕES QUE PODEM SER ASSINADAS JUNTO À LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO E QUE SOFRERAM REAJUSTES NOS PREÇOS - 1989

1. EL POPOLA ĈINIO — 1 ano - 1,12 OTN; 2 anos - 1,91 OTN; 3 anos - 2,78 OTN

Mensal, 72 pg. Editada pela Liga Chinesa de Esperanto. Revista cultural e informativa, abrangendo também o movimento esperantista na China.
(Sempre indicar se a assinatura é nova ou se é renovação)

2. ESPERANTO — 2,16 OTN

Órgão oficial da Associação Mundial de Esperanto (UEA). Mensal, 24 pg.

3. FOKUSO — 2,00 OTN

Trimestral, 64 pg. Editada pela Associação de Esperanto da Hungria, Revista científica-popular (substituiu, ampliando a área de abrangência, a revista "Internacia Komputado").

4. HEROLDO DE ESPERANTO — Via marítima 1,56 OTN; Via aérea 2,96 OTN

16 números ao ano. Jornal independente, internacional e o mais popular no movimento esperantista mundial.

5. JUNA AMIKO — 1 assinatura 0,79 OTN; a partir de 3 assinaturas(cada) 0,71 OTN; a partir de 7 assinaturas(cada) 0,61 OTN; a partir de 28 assinaturas(cada) 0,52 OTN

Bimestral, 24 pg. Para jovens e iniciantes. Artigos fáceis, peças teatrais, canções (com as notas musicais), anedotas, enigmas, etc. (Obs.: As revistas deverão ser enviadas para um só endereço).

6. KONTAKTO — 1,13 OTN

6 números ao ano, 16 pg. Revista dinâmica e ilustrada, para jovens e iniciantes. Editada pela Organização Mundial de Jovens Esperantistas (TEJO).

7. LA JARO — 0,61 OTN

Poŝkalendaro de la revuo "MONATO"

8. MONATO — 4,76 OTN

Revista noticiosa mensal, 32 pg. Periódico internacional independente sobre política, economia e cultura.

9. PACO — 1,73 OTN

Bimestral, 16 pg. Órgão oficial do MEM (Movimento Esperantista pela Paz Mundial)

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO
CAIXA POSTAL 11-1105
CEP 70084 - BRASÍLIA - DF (BRAZILO)

# NI SEMAS

EN SANTA MARIA/RS RADIO-STACIO ELSENDAS EN ESPERANTO:

Sub la produktado kaj prezentado de Delci Cipriani , prezidantino de ESSMA (Esperanto-Societo de Santa Maria), radio-stacio "Universidade" (de UFSM) elsendas de lundo ĝis vendredo, de la 20.45h ĝis la 21.00h, la programeron "ZYK em Esperanto". kun novaĵoj, intervjuoj k kursoj pri la Internacia Lingvo.

## en San-Francisko

esperanto 1985 oktobro

Promenante tra San-Franciska Ŝtata Universitato (SFŜU) somere, oni sentas la kutiman etoson de usona universitata vivo: studentoj rapidas al la lecionoj matene, kuŝas sur la razeno tagmeze. Sed mi sentis ĉi-jare ankaŭ alian etoson, tiun de Esperantujo, dum la 16a somera Esperanto-kursaro: trisemajnaj, intensaj kursoj, kiuj celas kapabligi studentojn paroli, aŭdkompreni, legi kaj skribi en la Internacia Lingvo.

Dum multaj jaroj la geografie disigita usona esperantistaro sentis la bezonon de regula, intensa studprogramo. Kiam en 1970 oni sukcesis organizi la unuajn somerajn kursojn ĉe SFŜU, fine realiĝis ebleco plenumi tiun bezonon. La aranĝo estis, en la fruaj tagoj, iom malgrandskala; William Auld, plurfoja instruisto ĉe la kursoj, instruis du nivelojn – bazan kaj progresigan. Sed la posta kreskado de la kursoj kondukis al ĝia sukceso en 1985, kiam tri instruistoj – d-roj Duncan Charters, James Cool kaj Amri Wandel – laboris kun proksimume 70 kursanoj el Usono, Kanado kaj Aŭstralio.

Grava eco de la kursoj estas, ke preskaŭ ĉiuj lernantoj kaj manĝas kaj loĝas kune ĉe la universitato. Tio ebligas vere intensan Esperanto-etoson, en kiu oni apenaŭ aŭdas krokodiladon. Post ekzameno en la unua tago, la partoprenantaro dividiĝas en kvar grupojn: komencantan, postkomencantan, progresintan kaj superan. Ĉiu grupo kunvenas dum tri horoj tage, kaj la horaro estas tiel planita, ke studentoj povas kromaŭskulti lecionojn sur unu nivelo pli aŭ malpli

alta ol la sia. Ĉi-jare prezentiĝis ankaŭ vespera kurso pri metodiko de fremdlingva kaj Esperanta instruado.

La komencantoj lernas per la rekta metodo, ofte uzante materialojn preparitajn aparte por ĉi tiu kurso. Lernolibroj por aliaj niveloj, sur kiuj oni ankaŭ uzis nur Esperanton, estis en 1985 i.a. *Paŝoj al plena posedo* de William Auld, *Faktoj kaj fantazioj* de Marjorie Boulton kaj *Elektitaj satiroj* de Efraim Kiŝon. La supera grupo lernas ne nur pri Esperanto, sed per Esperanto; ekzemple, ĉi-jare oni studis per la Esperanta traduko de *Don Quijote de la Mancha*, diskutante la signifon de la verko rilate al la tiama hispana socio.

Krom la regulaj kursoj supre menciitaj, oni aranĝis ankaŭ flankprogramon de prelegoj kaj diversaj prezentadoj. La enhavo kaj amplekso de tiuj programeroj multe dependas de la spertoj kaj iniciatemo de la studentaro. Ĝuste pro tio povas okazi nekutime varia elekto. En 1985, ekzemple, partoprenantoj pre-

**Foto: Vallon-Wheeler**



***Novaj lernantoj de Esperanto paŭzas por manĝi.***

legis pri la ĉeroka (indiana) lingvo kaj kulturo, pri la agado de TEJO, kaj aranĝis lumbildan prezentadon pri vojaĝo al Sudameriko.

La fina rezulto de tiom da streĉa laboro kaj amuziĝo estas granda progreso en la lingvokapablo de Esperanto-parolantoj en Nordameriko. La ekzisto de tia programo, per kiu haveblas universitata kredito (poentoj) estas ankaŭ ege efika varbilo por Esperanto.

**Curtis Ford**

## SANTA MARIA/RS: 1-A PANORAMO DE ESPERANTO

De la 25a ĝis la 28a de januaro ESSMA (Esperanto-Societo de Santa Maria (Mal.Floriano, 1750/512 cep 97060) aranĝis en sia sidejo sian 1-AN PANORAMON DE ESPERANTO, loka renkontiĝo kies temo estis la disvastigado de Esperanto.Cesar D. Soares, el Porto Alegre, kunordigis la temo-diskutadon "Kia estas la plej bona maniero disvastigi Esperanton en la komunumo" kaj prezentis prelegon pri la afero.Paulo Roberto Ferraz, el Santa Maria, prezentis sian labor plano-proponon por ESSMA por 1989.Paulo S.Nascimento (SM)prezentis interesan prelegon pri esperantologio titolita "Komparo inter Esperanto kaj Primitivaj Lingvoj".Ivan E.Colling (SM) prelegis surbaze de la verko "Esŝência e Futuro da Idéia de uma Língua Internacional", de L.L.Zamenhof.Cesar D. Soares prelegetis

pri la historio de la movado ĉu regiona ĉu nacia. Lasttage oni eke interŝanĝis ideojn pri la realigo de gaŭĉa e-renkontiĝo eĉ skizante programproponon. La renkontiĝo fermiĝis per agrabla etoso en tagmanĝo ĉe vegetarana restoracio.


# EBOR KOMENTAS

IAM mi aŭdis la jenon: "Se la estro bone laboras, la homoj progresas, kontraŭe ili maldiligente laboras." De tio oni konstatas, ke nur kun laborema kaj vigla estraro ni antaŭeniras (la brazilanoj bone scias tion). Bedaŭrinde, la estraro de Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO) eniris paralelan tunelon . Laŭ ekskuzoj prezentitaj en cirkuleroj ricevitaj - unu de la estraro, alia de la LKK-prezidanto pri la ne okaziĝo de la 11-a BEJK en Campina Grande/PB. Kun bona volo analizu kune kun mi: la nuna estraro, elektita en la 10-a BEJK - São José dos Campos (Jan./88), prezentis bonan planon: "Impulso" novformata, regionaj renkontiĝoj (okazis nur unu, en Porto Alegre), labori kun helpo de reprezentantoj en pluraj brazilaj urboj (vere laboris reprezentantoj de São Paulo, Porto Alegre, Campinas), pligrandigo de la anaro kaj multobligo de brazilanoj en la Pasporta Servo (efektive ne okazis tio), kontaktoj kun Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO),...Oni ne povas kritiki nur la estraro, kiu eĉ antaŭ la balotado en S.José dos Campos sin montris ne-sperta, sed ankaŭ la eks - membroj nuntempe pli aĝaj la brazila esperantista junularo, kiuj manifestiĝas nek kontraŭe, nek favore al la estrardecidoj...Kompreneble, mi supre menciis tiujn, kiuj scias pri la ekzistado de BEJO (alia manko de la estraro: ne propagandi ĝian ekzistadon. Tio faciligas junularajn E-grupojn fondi "BEJO-jn" pro tia nescio). Ĉar ne estis kongreso, okazis estrarkunsido en Salvador, 20-22/1/89, kies ĉefaj decidoj estis la jeno: a) labori por la disvolvo de la esperanta ideologio ekde la bazo de la anaro; b) ankoraŭ o-

kazigi la kongreson en Campina Grande/PB, en la lasta semajno de januraro/1990; c) reaperigi "Momenton" (oficiala organo de BEJO) per komputila kompostado; ĉ) aperigi "BEJO-Afiŝo" por ĝin disvastigi tra la tuta Brazilo; d) elekti interesajn titolojn al la junularo por eniri en la kampon de libro-servo; e) eldoni "Impulso" denove kun revua formato.Fine, kontraŭe rilate al la brazila registaro, mi opinias, ke oni devas fidi, postuli kaj eĉ proponi al BEJO-estraro.La homoj en Brazilo timas manifestiĝi.Enposteniĝi...aĥ, nek pensi!Partoprenu. Helpu la gejunulojn.Tiel ni fortigos la brazilan esperantan movadon.



LA MOVADO BEZONAS VIN.PARTOPRENU!



# HUMURE

## EDZECA DISPUTO

ŜI: Mi daŭre kuiradas kaj bakadas por vi kaj kion mi ricevas? Nenion!
LI: Vi estas feliĉa!Mi ricevas stomak-doloron!...

## NOVA RIĈULO

S-ro X, kiu dum la milito rapide riĉiĝis, eksciis, ke estas laŭmode ĉeesti koncertojn de klasika muziko.La saman vesperon li vizitis simfoni-koncerton, sed li alvenis malfrue meze de peco de Beethoven.
- Ĉu jam komenciĝis? - li demandis la kontroliston ĉe la pordo - Kion ili ludas nun?
- La Naŭan Simfonion...
- La naŭan? Jam?...Mi ne pensis, ke mi tiom malfruas!

## VORTBATALO

ŜI (post disputo): Ĉio en la domo apartenas al mi - mono, meblaro, tolaĵo - ĉio, ĉio!Kion vi do havis antaŭ la edziĝo?
LI: Pacon!

## DIFERENCO

- Kio estas la diferenco inter moderna kaj malmoderna knabino?
- Malmoderna knabino ruĝiĝas, kiam ŝi hontas...Kaj moderna knabino hontas, kiam ŝi ruĝiĝas.

## FELIĈO EN MALFELIĈO

Du amikoj hazarde renkontiĝas post longa tempo.Jen la konversacio:

A: Kiel vi fartas?
B: Dankon, ne tro bone, ... Kaj mi edziĝis, post kiam

mi pasintfoje vidis vin.
A: Tio estas bona sciiĝo!
B: Ne tute, ĉar mi edziĝis al malagrabla ino.
A: Malbone!
B: Ne tro, ĉar ŝi havis doton de du mil funtoj.
A: Vere, tio konsolas.
B: Tute ne; ĉar mi uzis tiun monon por aĉeti ŝafojn, kiuj ĉiuj mortis pro variolo.
A: Tio vere estas malfeliĉiga!
B: Ne tre malfeliĉiga; ĉar vendante la felojn mi enspezis pli ol kiom la ŝafoj kostis.
A: Tiukaze vi ja estis kompensita.
B: Fakte, ne tute; ĉar mia domo, kie mi deponis la monon, ruiniĝis pro fajro.
A: Bedaŭrindulo! Kia granda malfeliĉo!
B: Ne tiom granda; ĉar kun la domo ankaŭ forbrulis... mia edzino...

(Spritaĵoj elprenitaj el la libro "Gaja Leganto per Esperanto", far P.E.Schwerin)

# Porto Alegre



Liber-aera aŭditorio
"Araújo Vianna"
en Parko Farroupilha

Evandro de Lima Filho